



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 6

Novembro/Decembro 1964

8a jarkunveno en digna kadro

Solingen, la mondfama urbo de tranĉiloj kaj klingoj, gastigis de la 16a ĝis 18a de oktobro 1964 100 esperantistajn fervojistojn. La tradician jarkunvenon partoprenis ankaŭ gastoj el Belgio, Danlando, Finnlando, Francio, Hispanio, Luksemburgo kaj Nederlando. Kulmino estis la festvespero sabatvespere, dum kiu eminentuloj el la fervojista, sindikata kaj esperantista medio transdonis salutojn kaj multpromesajn bondezirojn.




Floroj por s-ino Anni Wiesmann post ŝiaj kantoj

La Germana Esperanta Fervojista Asocio havas la ŝancon okazigi sian jarkunvenon ĉiujfoje en alia urbo. En 1963 la gekolegoj vojaĝis al la historriĉa Regensburg. Tiun jaron ili sekvis la inviton al Solingen, situanta en la Berg-a Lando, ne malproksima al Köln.

Ĉi tie ne estu ripetata denove la priskribo de la tiea regiono, kiun jam entenas BULTENO n-ro 4/64. Tamen estu menciataj kelkaj impresoj, ĉefe tiuj de la rondveturo. En pluvon dronis la moderniginda stacidomo de Solingen-Ohligs, kiam mi elvagoniĝis. Unu el la multnombraj omnibusoj alportis min al la hotelo, ne pli granda ol tiu siatempe en Stoke-on-Trent (Anglio), kiel entute ne ĉesis la impresoj, ke Solingen laŭ strukturo kaj situo havas certan similecon kun la brita urbo. GEFA kongresis en la urboparto Solingen-Wald, kiu posedas ankoraŭ multajn trafakajn domojn el la periodo, kiam la speciala industrio de tranĉiloj evoluis el familiaj entreprenoj. Tiu karaktero multfoje konserviĝis. Oni ne vidas grandajn fabrikojn kun altaj kamentoj. Kun surprizo la vizitanto rigardas bovojn sur herbejoj aŭ arbarojn, kiuj apartenas al la urba areo.

Solingen posedas unikan muzeon. Ĝi konigas la varian historion de la tiea industrio ĝis la nuntempo. Ĉiaj tranĉinstrumentoj servantaj al pacaj kaj mortigaj celoj troviĝas tie. Ne mirinde,



La mondkonata ŝvebramo de Wuppertal

ke la pacemaj esperantistoj iom timeme vagis en la salonoj ĉirkaŭitaj de sabroj kaj glavoj el pasintaj jarcentoj. Sed la omnibusveturado kondukis ankaŭ al najbara urbo. En Wuppertal-Vohwinkel ni grimpis, kelkaj la unuan fojon, en la faman ŝvebramon, kiu funkcias jam de 60 jaroj sen unusola akcidento. Nu, oni ne sentis alie ol en tramo. La vagonaro ŝvebante rulis, foje ĝi sekvis la linion de strato, foje tiun de la Wupperrivero. Sed ekzistis plua teknika vidindaĵo: la plej alta fervoja ponto de Germanio apud Müngsten. La romantika montaro, nun vestita en la plej belaj koloroj de la aŭtuno, devigis niajn antaŭulojn konstrui tiun elstaran ponton kun altitudo de 107 metroj dum la jaroj 1893 ĝis 1897 je la nuntempe ridinda prezo de 2,7 milionoj da markoj. Returnante al la urbo Solingen ni admiris la imponan novan teatron kaj ĝuis la komentariojn de la afabla s-ro Kühnert, reprezentanto de la urba informa servo. Laŭ lia konvinka ilustrado oni povas bone vivi, kiel enloĝanto, en tiu urbo.

Gazetaro favore raportis

Jam la 16an, antaŭtagmeze, la GEFA-estraro estis invitinta en la luksa teatro al gazetara konferenco. La diskuto okazis en agrabla sfero, dum kiu la lokaj ĵurnalistoj montris pli multe ol la kutiman rutinan intereson. Iliaj raportoj aperintaj la sekvontajn tagojn estis objektivaj kaj trafe informis la loĝantaron pri senco kaj celo de nia GEFA-jarkunveno. La gazetoj ankaŭ akcentis, ke la urbo Solingen ĵus estis eldoninta esperantlingvan tekston por la urboprospekto. Ankaŭ la konsento de la Federacia Fervojo esperantigi horartekstojn de 11 jaroj estis agnoskita kun laŭdo.

Lingvaj ekzamenoj ne okazis

GEFA aranĝas de kelkaj jaroj en la kadro de siaj jarkunvenoj lingvajn ekzamenojn, kie ekza-

menas la kandidatojn aparta komisiono de fervojistaj kolegoj. Tia ekzameno estis antaŭvidita ankaŭ tiujare. Sed pro certaj kaŭzoj ĝi ne okazis en Solingen. Kelkajn semajnojn antaŭe tri kandidatoj sukcesis fari en Frankfurt la ekzamenon por kursgvidantoj, inter kiuj estis la GEFA-sekretarino s-ino Kruse. Koran gratulon!

Aktiva GEFA-estraro

Kvarfoje dum la jaro la GEFA-estraro kunvenas, se oni ne enkalkulas sennombrajn konferencojn en pli malgranda rondo aŭ telefonadojn. Unu el tiuj oficialaj kunvenoj okazis ankaŭ la antaŭan tagon (16. 10.). Je preparolitaj temoj ampleksis aktualajn metodojn de la varbado, distribuon de organizaj laboroj al aliaj volontuloj, preparlaborojn por la fakvortareto, kunlaboro kun aliaj organizaĵoj interne de la „Bundesbahn-Sozialwerk“ (Sociala Servo) kaj financajn aferojn. Vastan lokon prenis ankaŭ la agado de GEFA en la „Internacia Fervojista Esperanto-Federacio“, kie la kunlaboro en pluraj komisionoj pligrandiĝis de jaro al jaro, kiel kun laŭdo agnoskis letere la IFEF-prezidanto de Jong. Restas raportinde, ke la estraro ne ŝanĝiĝis. La estraranoj estas nomigitaj per la ĉefestraro de la Sociala Servo kaj ne bezonas esti elektataj per la asocioj.

Konferenco kun la distriktkomisiitoj

Konforme al la 16 fervojaj direktoj funkcias 16 komisiitoj por Esperanto. Ili estas la motoro de la distrikta laboro, kaj en iliaj manoj kuŝas sukceso aŭ stagnado. La plej multaj el ili estis venintaj por preparoli siajn specialajn problemojn kune kun la GEFA-estraro (17. 10.). Tiun kunsidon honorigis per sia ĉesto s-ro d-ro Kühne, membro de la ĉefestraro de la Sociala Servo, kaj s-ro Bald, membro de la Sociala Servo en la



Laborkunsido de estraro kun distrikataj komisiitoj

distrikto Wuppertal. Ilia partopreno al la diskutoj pruvis, ke inter la postlaboraj okupoj de la fervojistoj tiu pri Esperanto okupas apartan pozicion. El financa vidpunkto la nombro de la membroj ne povas esti taksata kiel la ĉefa mezurilo. D-ro Kühne promesis daŭrigi la ĝisnunan subtenon kaj petis siaflanke, ke GEFA pere de siaj interligoj intervenu ĉe landaj asocioj aliĝi al la internacia kultura organizo FISAIC.

GEFA-prezidanto Giessner substrekkis ankoraŭfoje la valoron de la buŝa propagando, kiun aliaj rimedoj (varbfolioj, afiŝoj, glumarkoj, anoncoj ktp.) nur povas kompletigi. Laŭ lia raporto la laboro de la estraranoj suferis dum la jaro ege sub deĵoraj troŝarĝoj kaj eksterordinaraj taskoj. Pri la traktitaj temoj informas detale aparta jarraporto sur paĝo 4/5.

La vigla diskuto okupiĝis pri la stimulo al simpatioj, pri financaj kaj varbaj proceduroj, pri la centra biblioteko, junulara laboro, plibonigo kaj distribuo de la BULTENO kaj aliaj aferoj. S-ro Kiefer, la komisiito por la distrikto Stuttgart, invitis la asocion por la 9a jarkunveno al Stuttgart. Post 3 1/2-hora laborkunsido GEFA-prezidanto Giessner dankis kaj finis ĝin.

Salutoj, distroj, dancoj

Sabatvespere (17. 10.) pleniĝis la granda salono de la restoracio „Stadt Wald“ kun proksimume 200 esperantistoj kaj gastoj, ĉar la „Rejn-Vestfalia Ligo (Revelo) eluzis la okazon por aranĝi sian regionan kunvenon en la kadro de la GEFA-jarkunveno. La scenejo estis ornamita per multaj floroj kaj la granda GEFA-flago. La komisiito por la distrikto Wuppertal, s-ro Grass, en kies mano kuŝis ĉiuj preparoj, malfermis la festvesperon. Lin sekvis GEFA-prezidanto Giessner, kiu salutis la ĉeestantojn kun granda ĝojo. „Estas precipe agrabala okazo“, li diris, „por niaj junaj geamikoj, kiuj tiamaniere ekstere de la IFEF-kongresoj povas kunveni kaj amuzi en rondo de gesamideanoj kaj tiamaniere praktikas la teoriojn, kiuj bazas sur amikeco kaj kontaktoj de la esperantistoj.“ Honore de la mortinta GEFA-ano s-ro Rieckhoff ĉiuj ekstaris. Pluaj salutoj estis direktataj al la honorgastoj, kiuj grandparte salutis siaflanke la ĉeestantojn kaj estas nomigitaj sube. IFEF-prezidanto de Jong ne povis partopreni, ĉar li troviĝis je tiu tempo en Anglio okaze de la jarkunveno de niaj britaj gekolegoj. Sed li sendis eksterordinare koran salutleteron, kiu resume estis publikigata. Ankaŭ la prezidantoj de la svisa kaj brita landaj asocioj, s-roj Greutert kaj Barks, sendis salutleterojn.

La vicon de la alparolantaj honorgastoj malfermis s-ro d-ro Kühne, membro de la ĉefestraro de la Sociala organizo en Frankfurt. Je ĉies ekmiro

li laŭtleĝis sian alparolon en facile komprenebla Esperanto, kvankam li ne regas la internacian lingvon. Li esprimis sian admiron pri tiu unika ŝatokupo, kiu servas evidente al amikaj rilatoj kun eksterlandaj gekolegoj. Oni konstatas la pozitivan rezonon je la partopreno de junulara grupo el Francio.

Kiel reprezentanto de la ĉefestraro de la fervojista sindikato (GdED) s-ro Klaes (Frankfurt) petis unue komprenon, ke lia lingva malkapableco ne konvenas al la positiva sinteno flanke de la sindikato. Esperanto ne estas nura ŝatokupo, ĝia bazo estas idealismo kaj emfazo, kiuj pludaŭris du mondmilitojn. Bedaŭrinde la valoro de asocio estas taksata ofte laŭ la nombro de la membroj. La esperantistoj ne malĝoju, ke ili havas relative malmultajn membrojn. Decida estas la fervora entuziasmo, kion pruvas la hodiaŭa vespero.

Por la sindikato de la fervojistaj oficistoj (GDBA) transdonis la salutojn s-ro Engels (Wuppertal). La sindikato volas elĉerpi la eblojn, kiujn Esperanto ofertas, precipe por la junuloj. Tio estas konsiderante la kreskadon de Eŭropo urĝa tasko. Plue validas la devizo: reloj interligas landojn, Esperanto la popolojn.

Ankaŭ la urbo Solingen estis reprezentata per la urba konsilisto Krings. Li bonvenigis la kongreson substrekkante ankaŭ, ke Esperanto estas ne nur hobia. En tiu pli mallarĝanta mondo ĝi ricevos la alstrebitan reputacion. Ni havas la deziron kompreniĝi inter la popoloj, sed ni ne povas superi la lingvajn malfacilaĵojn. Sekvis la emocia alparolo de landaj kaj aliaj reprezentantoj. Salutis por

Belgio: s-ro Steenhot,

Danlando: s-ro Heide,

Francio: s-ro Bernier,

Nederlando: s-ro van Leeuwen,

Urba grupo Solingen: s-ro Bull,

Rejn-Vestfalia Ligo: s-ro Galle.

La vicon fermis s-ro Pickel (Nürnberg), kiu nome de la Germana Esperanto-Asocio (GEA) akcentis la gravecon de la germanaj esperantistaj fervojistoj kaj laŭdis la dekonujan eldonon de horaroj kun Esperanto-teksto per la Germana Federacia Fervojo. Tio kaj aliaj sukcesoj estas bone agnoskitaj per la Universala Esperanto-Asocio (UEA). La ĝisnuna kunlaboro inter GEA kaj GEFA estas vere harmonia. Fine li alvokis por la speciala tasko de la esperantistoj en 1965, nome kolekti subskribojn por nova peticio en la proklamita „jaro de la internacia kunlaboro“. Starante aŭdis la ĉeestantoj la himnon luditan de la orkestro.

Tia vespero povas konsisti ne nur el alparoloj. Kiel bone Esperanto scias interpreti la arton, pruvus du kantaĵoj, „Averto“ de Mozart kaj „Kiam amor' vin vizitas“ de Müller, prezentitaj kun la perfekteco de profesia kapableco de s-ino Wiesmann el Grafenau. Lerte akompenis ŝin d-ro v. Endert. La orkestro Stamm el Solingen kontribuis per diversaj muzikaĵoj al la bona sukceso de tiu vespero. La ĉeestantojn atendis speciala surprizo. La junulara grupo el Francio ludis skeĉon el la medio de frenezulejo. Estis amuze, aŭskulti la spritajn dialogojn kaj observi la fervoron de la junaj artistoj, kiuj rikoltis grandan aplaŭdon. Sur la scenejo ili prezentis krome kelkajn kanzonojn en esperanta kaj franca lingvo. Restis ankoraŭ kelkaj horoj por dediĉi sin al la dancado sur la glata pargeto. La orkestro ludis agrablajn kaj fajrajn melodiojn laŭ ĉies gusto, dum la babilado inter la kunsidantoj ne ĉesis. Longtempe post noktmezo adiaŭis la lastaj.



Teatra grupo de la francaj junuloj

Esperanto sur la ekrano

La granda salono estis scenejo ankaŭ por kelkaj aliaj prezentadoj venontan matenon (18. 10.). UEA-prezidanto Lapenna direktis sian voĉon al la aŭskultantoj per ĵus aperinta disko. Lia alparolo farita okaze de la pasinta UE-kongreso en Nederlando vekis novan entuziasmon kaj kuraĝon. Al la impresoriĉa lasta IFEF-kongreso en Belgio kondukis serio de koloraj diapozitivoj, kiujn prezentis s-ro Ritterspach. Liajn klarigojn akompanis originalaj alparoloj kaj muzikaĵoj surbendigataj de s-ro Barnickel. Du sonfilmoj, unu kun propaganda, la alia kun humora karaktero, finis la aranĝon. La unua „Reloj en neĝo“ temis pri vojaĝo per fervojo al skiferiejo en Aŭstrio, dum la alia filmo „La malgranda urso“ ilustris la aventurojn de urseto en vagonaro.

Ankoraŭfoje sidis kune la kongresanoj por tagmanĝi komune ĉe longaj tabloj, cetere je ne tre modestaj prezoj. Oni dankis tutkore al ges-roj Grass, kiuj estis transprenintaj kun sindono kaj fervoro la nefacilan taskon organizi nian bone sukcesintan 8an jarkunvenon en Solingen. Al la restintoj ofertis sin poste la okazo rigardi bildojn pri Düsseldorf, la venontjara kongresurbo de la Germana Esperanto-Asocio. Ni esperantistaj fervojistoj renkontiĝos la 16/17an de oktobro 1965 en Stuttgart kaj invitas jam nun al multnombra partopreno el en- kaj eksterlando.

W.B.

Bildoj: Graumann (Wuppertal)

Jarraporto

de prezidanto Joachim Gießner

La loko de ĉi tiu jarkunveno, la urbo Solingen, situas en tiel industria kiel bela pejzaĝo de okcidenta Germanio. Ĝi prezentas al ni la en la mondo unikan klingo-muzeon kaj la speciale por fervojistoj interesan ponteĝon de Müngsten. Rigardante la ceterajn programerojn oni do ne bezonas dubi, ke la partoprenantoj en la 8a jarkunveno ĝuos du agrablajn tagojn en rondo de samideanaj kolegoj.

Komencante la raporton, mi devas ripeti kun sama bedaŭro kiel lastjare, ke la estrara agado daŭre suferis pro la pli kaj pli forta dejora raciigado paralele al konstante kreskantaj postuloj flanke de la faka kaj ĝenerala Esperanto-movado en formo de korespondado, enketoj, projektado kaj plenumado de ideoj ktp. Oni ne povas diri, ke io el tio, kion ni faris, estis superflua, male, ne estis eble al ni fari ĉion necesan. Tutcerte la malfacilaĵoj malaltiĝus, se ĉiuj kunlaborantoj en la distriktoj kaj grupoj vere kunlaborus. Sed tio nur parte okazas. La neplenumado de petitaj aŭ konsentitaj aferoj kaj projektoj tre ofte kaŭzas neimageblan tempoperdon al la estraranoj. Ni tamen profunde dankas al tiuj, kiuj akurate kaj bonvole kunhelpis antaŭenigi nian aferon spite al la daŭre ampleksiĝantaj dejoraj postuloj.

El la agado de la pasinta jaro mi elektis jenajn punktojn:

Organizaj aferoj:

La distriktkomisiito de Saarbrücken, s-ro BOR Winkelhaus, pro dejoraj kaŭzoj devis fordoni sian oficon. Kun danko ni ĉiam memoros je li. Transprenis la oficon s-ro BS Haupenthal, Ga Saarbrücken Hgbf.

Du membroj, kiuj havas grandajn meritojn en nia germana asocio, atingis gravajn punktojn en siaj vivoj. **Iama prezidanto de GEFA**, kolego

BR Simon, la 13an de majo 1964 festis sian 65. naskiĝtagon kaj samtempe emeritiĝis. Alia kolego, **BOA**mtm i.R. Jäger, la 23an de julio travivis la saman datrevenon. Ankoraŭfoje dankon al ambaŭ kaj longjaraĵan sanon. Ni honoris ilin en **Bultenoj 2** resp 4/1964.

Kiel konate, la kostoj por vivtenado en ĉiuj landoj daŭre kreskadis. Precipe en Nederlando, kie ili estis restintaj relative stabilaj dum longa tempo, la prezoj nun ankaŭ konsiderinde altiĝis. Tio grave influis la kostojn, kiujn IFEF devas pagi por la presado de LIF kaj por afrankoj. El tio rezultigis, ke la IFEF-estraro en la kongreso de Bruselo petis plialtigi la jarkotizon je unu nederlanda guldeno. La germana estraro ne povis refuti la motivojn de la IFEF-estraro kaj konsentis la proponon. Tio signifas po monato eĉ ne 10 pfenigojn. Tial ni nun devas peti de niaj germanaj membroj ekde 1965 jarkotizon de 3,50 GM, samtempe petante ilin havi komprenon por la situacio de IFEF.

Same bone kiel en la antaŭaj jaroj estis la ĉo pri okazintaĵoj de nia germana asocio kaj pri la IFEF-kongreso en nacilingvaj gazetoj kaj en fakaj revuoj. Mi mencias „Sozialblatt“, kiu publikigis artikolojn ilustritajn pri la 7a jarkunveno kaj la brusela kongreso. Pli-malpli detalaj notoj aperis ekz. en „Bundesbahn-Mitteilungen“, „Rad und Schiene“, „Die Bundesbahn“.

El tagaj gazetoj senditaj al ni oni povis ekkoni, ke minimume en kelkaj distriktoj, precipe Köln, Nürnberg kaj Wuppertal, oni vige laboras kaj informas la publikon.

La **Dokumenta Servo** de DB ankaŭ ĉi-jare envicigis en siajn kolektojn la germanlingven tradukitan tekston de la brusela fakprelego.

En Kanado oni momente klopodas kompili bildvortaron, kiu i. a. enhavos 12 paĝojn pri fervojaj terminoj. Kolego Ritterspach aldone al siaj jam ampleksaj okupoj terminaraj transprenis la korektadon de tiuj terminproponoj, por ke estu evitotaj diferencoj inter la estonta fervoja terminaro kaj la planita ĝenerala bildvortaro. Paralele al tio progresas la laboro por la nova terminareto, kiun la germana asocio konforme al decido de la kongreso en Stoke estas preparanta. Ankaŭ tiuj laboroj grave estas malhelpitaj pro personaj kaj deĵoraj kaŭzoj. Tio estas bedaŭrinda, sed ne ŝanĝebla.

Alia grava afero, en kiu kiel membro de respektiva komisiono aktiviĝas kolego Barnickel, estas la starigo de nova IFEF-statuto. Tiu laboro postulas ne nur ekzaktan pensadon kaj multe da objektiveco, sed ankaŭ ampleksan korespondadon kaj ĉiam denove tempon. Estas dezirinde, ke en la venonta IFEF-kongreso la statuto estos finfiksata.

Auszug

aus dem in Esperanto gegebenen **Jahresbericht** bei der 8. Jahreshauptversammlung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten am 17./18. 10. 1964 in Solingen.

Die Arbeit des Vorstands wurde auch im abgelaufenen Berichtszeitraum ungünstig beeinflusst durch stärkste dienstliche Belastung, verbunden mit ständig steigenden Anforderungen seitens der fachlichen und allgemeinen Esperanto-Bewegung. Auch für die sonstigen ehrenamtlichen Mitarbeiter und Helfer in den Bezirken und Gruppen wird es infolge der überall sich verstärkenden Rationalisierung immer schwieriger, die notwendige Zeit für die Bewältigung ihrer Aufgaben zu finden. Um so mehr Dank gebührt allen, die trotzdem immer wieder ihre Freizeit für die gemeinsame Sache opfern. Im Ganzen wurde jedoch wieder erfreuliche Arbeit geleistet.

Neben einer geringfügigen Beitragserhöhung von monatlich 8 Pfennig ist zunächst das **positive Echo** zu erwähnen, das unsere Veranstaltungen in der **Bundesbahn** („Bundesbahn“, „Rad und Schiene“, „Bundesbahn-Mitteilungen“, „Sozialblatt“ u. a.) und in der gesamten **Esperantopresse** gefunden haben. Auch in verschiedenen deutschen **Tageszeitungen** berichteten z. T. sehr ausführliche bebilderte Artikel über unsere Arbeit. Der **Dokumentationsdienst** der DB hat wieder die Fachvorlesung des Kongresses in Brüssel in seine Verzeichnisse aufgenommen.

Unser deutscher Landesverband unterhält sehr gute Beziehungen zu den benachbarten Ländern. Er wirkt mit bei der Überprüfung eines in Kanada in Bearbeitung befindlichen **Esperanto-Bilder-Duden** und bereitet augenblicklich ein **Fachwörterbuch** Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch vor. Beide sind außerordentlich wichtige Aufgaben. Auch bei der Neuaufstellung der **Statuten** des internationalen Dachverbandes sind wir maßgeblich beteiligt.

Unsere **Zentralbücherei** wird weiter ausgebaut. Dabei werden alle Bezirke helfen, so daß mit der **Zeit** eine wirklich leistungsfähige Bücherei entstehen wird. Bücherverzeichnis und Ausleihverfahren werden im Mitteilungsblatt „**Bulteno**“ veröffentlicht.

Für die **Werbung** wurde in einer Auflage von 10 000 Stück ein neues **Flugblatt** herausgegeben, das besonders für Eisenbahner bearbeitet wurde. Es ist in erster Linie für die allgemeine Aufklärung gedacht, soll aber in gezielter Werbung verwendet werden.

Die **Prüfungskommission** unserer deutschen Vereinigung hat seit ihrer Gründung im Jahre

1962 bisher 23 Kandidaten geprüft. Davon bestanden 19 das Examen der 1. Stufe (Sprachprüfung), darunter ein Blinder, und 4 das der 2. Stufe (Kursleiterprüfung).

Mit den Eisenbahner-Funkamateuren wurde Verbindung aufgenommen. Es soll versucht werden, Esperanto für den Funkverkehr nutzbar

zu machen. Unsere bereits eingespielte Organisation könnte dabei wertvolle Hilfe leisten.

Unterdessen wurde damit begonnen, unsere **Veteranen** über ihre Erinnerungen aus der Zeit zwischen den Kriegen zu befragen. Ihre Äußerungen werden auf Tonband festgehalten.

Die **Jugendarbeit** soll weiter intensiviert werden. Gi

Solingen — ein Erfolg

Die 8. Jahresversammlung liegt hinter uns. Es stellt sich die Frage, ob sie als erfolgreich zu betrachten ist. Wir meinen: ja. Den Esperantisten steht im Laufe eines Jahres zwar schon ein reichhaltiger Kalender von Veranstaltungen zur Verfügung. Weshalb aber sollten die deutschen Eisenbahner-Esperantisten, die den Vorzug genießen, sich im Rahmen des Bundesbahn-Sozialwerkes offiziell betätigen zu können, auf die Möglichkeit eines jährlich stattfindenden Landestreffens verzichten? 1963 nahm uns das traditionsreiche Regensburg auf, 1964 war die Klingensteinadt Solingen der Gastgeber.

Gewiß, die Sonne war nicht so oft wie in den vorangegangenen Jahren zu sehen. Zumindest hielten aber die Regenwolken während der Rundfahrten einen Burgfrieden. Das Bergische Land zeigte mit Stolz seine ihm verbliebenen Fachwerkbauten, aber genau so bereitwillig moderne Architektur wie etwa das geglückte Stadttheater. Es bot herbstlich bunte Wälder und durch einen Besuch im einzigartigen Klingensteinmuseum einen Einblick in die Besonderheit der Stadt. Die Verantwortlichen der „Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten“ redeten sich in zwei Arbeitssitzungen die Köpfe heiß, worüber der Jahresbericht einiges zu sagen weiß. Die Öffentlichkeit brachte viel Verständnis und Aufmerksamkeit

entgegen. Es erschien eine Reihe recht positiver Presseberichte. Auch die Stadt Solingen zeigte sympathische Züge. Sie entbot zu Beginn des Buntens Abends durch Herrn Stadtrat Krings sehr herzliche Willkommensgrüße und hatte darüber hinaus für den Stadtprospekt eine Übersetzung in Esperanto herausgebracht.

Noch eindrucksvoller erschien das Interesse des Hauptvorstandes beim Bundesbahn-Sozialwerk. **BOR. Dr. Kühne** war eigens aus Frankfurt gekommen. Bei der Arbeitssitzung sprach er seine Anerkennung über die vielfältige, völkerverbindende Tätigkeit der Eisenbahner-Esperantisten aus und wies auf die Verflechtung mit internationalen Freizeitverbänden der Eisenbahnen hin. Auf dem Buntens Abend überraschte er die Zuhörer mit einer Begrüßungsansprache in Esperanto.

Beide Gewerkschaften (GdED und GDBA) bekundigten durch ihre Sprecher, die Herren **Klaes** (Frankfurt) und **Engels** (Wuppertal) ihr Wohlwollen für die Ziele der Eisenbahner-Esperantisten. Von gewerkschaftlicher Seite aus werde im Esperanto mehr als nur eine Freizeitbeschäftigung gesehen. So mancher der 200 Anwesenden, dessen Idealismus, zeitweise bedingt, zurückgegangen ist, mag neuen Mut geschöpft haben. Die Jugend findet manchmal nur zögernd zu Esperanto. Wie gut sie sich aber dann zu verständi-

gen weiß, zeigte eine französische Jugendgruppe, die einen gelungenen Sketch und Volkslieder darbot. Sie gab bei den späteren Twist-Tänzen auch den Ton an. Erfreulich groß war auch die Teilnahme ausländischer Sprachfreunde. Sie kamen aus Belgien, Dänemark, Finnland, Frankreich, Luxemburg, Niederlande und Spanien. So sollte es bleiben! Die Internationale Sprache wäre wertlos, wenn sie sich nicht bei Begegnungen mit ausländischen Sprachfreunden anwenden ließe.

Es fiel noch manche Anerkennung, etwa von Herrn **Pickel** (Nürnberg), dem Sekretär des Deutschen Esperanto-Bundes, der die seit 11 Jahren währende Bereitschaft der Deutschen Bundesbahn lobte, Kursbücher und Reisefernfahrpläne mit Esperanto-Texten herauszugeben. Aber nicht weniger wichtig war das gesellige Beisammensein. Ein vertonter Dia-Vortrag weckte Erinnerungen an den letzten internationalen Kongreß in Brüssel. Die Filmstelle der DB vermittelte mit zwei Tonfilmen winterliche Vorfreuden und einiges Schmunzeln. Alles in allem: es hat sich gelohnt. Herrn und Frau **Graß**, die die wesentliche Last der Tagung trugen, sei herzlich für das Gelingen gedankt.

Im Oktober 1965 wird das nicht weniger reizvolle Stuttgart Tagungsort der 9. Jahresversammlung sein. Können wir mit Ihnen rechnen?

W. B.

La singulto

Maljuna Feddersen ĵus fermis sian malgrandan laktovendejon, kiam peza veturilo kun kriĉantaj bremsoj haltis antaŭ la pordo. Elegante vestita, iom rondaspekta sinjoro mezaĝa, elpremiĝis el ĝi, kaj antaŭ ol li povis ion diri, la maljunulo demandis: „Kion do, ĉu botelon da lakto?“ „Lakto?“ grumbliis la sinjoro. „Boneta ideo! Lakto ĉiam min vigligas, kiam mi longtempe veturas. Do, botelon da lakto! Sed ankoraŭ io, mia kara: ĉu en ĉi tiu vilaĝo troviĝas drogejo?“

Singarde maljuna Feddersen apogis sian balailon kontraŭ la doman muron. „Drogejo?“ Kun bedaŭro li ŝultrotiris. „Ne, io tia ne ekzistas!“

La elegante vestita sinjoro insultis mallatute. „Kia distanco estas ĝis Bergstadt?“

„Nu“, grumbliis maljuna Feddersen pripense, „ĉirkaŭ 30 km, certe ja“.

„Ho ve“, diris la sinjoro. Nun li ofertis cigaredon al la maljunulo. „Sed eble vi konas rimedon kontraŭ singulto?“ „Hm!“, rediris heziteme maljuna Feddersen, „mi ja konas tre taŭgan domrimedon, sed...“

„Nenia Sed!“ interbris la fremdulo enirante en la butikon. „Urĝegas!“

„Ne saltu!“, diris maljuna Feddersen, neimpresite. Poste li elprenis viŝĉifonon el la verŝujo, metis ĝin sub la kranon kaj plurfuje batis ĝin en la vizaĝon de l' fremdulo.

La elegante vestita sinjoro ŝanceliĝis kaj rigidiginte rigardis sian makulitajn veston. „Homo!“ li elbruis indignite. „Ĉu vi freneziĝis?“

Ofendite maljuna Feddersen metis la brakojn sur la koksojn. „Mi? Kiel? Tio certe helpos. Ĉu vi ne rimarkas, ke malaperis via singulto?“

„Kia mia singulto?“ kriis la fremdulo. „Estas mia edzino en la aŭto, kiu havas ĝin!“

(Traduk. el „Hp-Null“ de Reinhard Hauptenthal)

„Bildskribo“ helpu la pasaĝerojn!

Tiel kaj simile tekstas la sensaciaj surskriboj de artikoloj, kiuj okupiĝas lastatempe pri la bildskribo oficiale nomita „piktogramo“. UIC, la „Internacia Unuiĝo de la Fervojoj“ decidis enkonduki unuecajn simbolojn en la internacia pasaĝertrafiko, ekz. por bileteldonejo, telefono, monŝanĝejo.

Ni intencas trakti tiun temon eble plej baldaŭ el vidpunkto de nia faka movado.

La redakcio

EL LA GRUPOJ

Kaiserslautern. Am 18. Oktober verstarb in Kaiserslautern das langjährige Mitglied unserer Vereinigung, Herr Karl Schmitt. Wir werden ihm ein ehrendes Andenken bewahren.

Duisburg. La 14an de novembro okazis en Duisburg (konferenc-ĉambro de la ĉefstacidomo) kunveno por la distrikto Essen. La komisiito por la distrikto Essen, kolego Schnetzer el Hamm, donis raporton pri la GEFA-jarkunveno en Solingen. Poste oni preparolis la vintran laboron. La kunveno ĉestis ankaŭ gesamideanoj de „Kreis der Esperanto-Freunde Duisburg“. I. a. oni aŭdigis per sonbendo la salutparolon de prof. d-ro Ivo Lapenna okaze de la 49a UE-Kongreso en Den Haag (Nederlando).

Saarbrücken. Anlässlich der Hauptvertreterversammlung in Saarbrücken veranstaltete das Bundesbahn-Sozialwerk eine umfangreiche Ausstellung „Freizeitschaffen der Eisenbahner“, in der u.a. Gemälde, Plastiken, Fotografien und Briefmarken gezeigt wurden. Auch die Esperanto-Gruppe des BSW beteiligte sich mit einem Stand.


Ausgestellt wurden vom 20.

bis 23. Oktober auf drei großen Tischen Städteführer und Faltprospekte in Esperanto, darunter auch solche der DB, Briefumschläge aus aller Welt, Zeitungen und Zeitschriften. Eine reichhaltige Auswahl an Esperanto-Literatur, sowohl von Originalwerken als auch übersetzten, vermittelte einen Überblick über das Schritttum der Internationalen Sprache.

Eine große Esperanto-Flagge mit dem grünen Stern bildete einen recht guten Hintergrund. Ein eigens zum Zweck der Ausstellung besprochenes Tonband gab die notwendigen Erklärungen über Wesen, Ziel und Aufgabe der Internationalen Sprache. Auch auf einen bald stattfindenden Sprachkurs wurde aufmerksam gemacht, u.a. im Programmheft der Gesamtveranstaltung.

Die Ausstellung bot darüber hinaus eine gute Gelegenheit, Unterschriften zum Antrag des Esperanto-Weltbundes an die Vereinten Nationen zum Jahr der Internationalen Zusammenarbeit zu sammeln. Gerade diese Aktion ist jetzt von besonderer Wichtigkeit und sollte von jedem Esperantisten tatkräftig unterstützt werden.

A. Hauptenthal



Herr Alois Hauptenthal, Bezirksbeauftragter für Esperanto im BSW Saarbrücken, vor dem Esperanto-Stand.

NI LEGIS EN...

Semajnfino en la insulurbo Lindau

Bulteno de la Aŭstria Sekcio de IFEF, apelacias (en okt.) al la aktiveco per artikolo „Für eine bessere Zukunft“.

DEFA-BULTENO, organo de la Dana Esperantista Fervoĵista Asocio, skizas (en nov.) ampleksan programon pri la projektitaj aranĝoj en Aarhus kaj Kopenhago kaj donas super-rigardon pri la kongreslando Norvegio, kie okazos la venonta IFEF-kongreso.

Der Trichter/La Funelo bringt (in Nr. 3) weiterhin aktuelle Nachrichten in Deutsch über die Internationale Sprache. Für die Werbung und Information sehr zu empfehlen.

EL POPOLA ĈINIO, korelore ilustrita revuo, i. a. priskribas (en n-ro 5) en la artikolo „Pekino, hieraŭ kaj hodiaŭ“ la tian centran stacion kun 6 kajoj kaj 12 trakoj.

Esperanto en Skotlando publicas (en aŭtuna eldono) scenon el „Antonio kaj Kleopatra“ de W. Shakespeare en traduko de W. Auld.

FERVOJISTO, organo de la Fervoĵista Esperantista Rondo Nederlanda, interese raportas (en sept.) pri la rezultoj de la FERN-jarkunveno en Rotterdam.

HUNGARA FERVOJISTA MONDO, publikigas (en n-ro 2) impresigan kaj detalan raporton pri la tiujara IFEF-kongreso en Belgio.

INTERLINGVISTIKA INFORMASERVO, eldonita de la Societo por Internacia Lingvo, studas (en n-ro 3) la problemon „Esperantologa Kongreso — estonta“.

ITALIA FERVOJISTO prezentas (en n-ro 9/10) la novan prezidanton de la Itala Fervoĵista Esperanto-Asocio. Estas

prof. d-ro ing. Bernardino Latanzi di Monterubiagio el Romo.

Jugoslavia Fervoĵisto anoncas la aperon de speciala nova lenrolibro, „Esperanto por fervoĵistoj“.

Kontakto estas modernaspekta grandformata organo de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).

En **La Fervoĵisto**, organo de la Franca IFEF-Sekcio, ekzamenas (en okt.) la FEFA-prezidanto la problemojn de (tro) granda landa estraro.

La Socialisto emfazas (en sept.) pri la celoj de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista.

Das Lichtenfelser Tagblatt bringt als Folge eines zum DB-Fahrplan mit Esperantotext negativ gehaltenen Artikels vom 15. 10. zwei aufschlußreiche positive Zuschriften.

MORETO, organo laboranta por la internacia registro de la mondĉivitanoj, apelacias (en okt.) al kunlaboro en la monda reto de Esperanto-tradukado.

Die Neue Rhein-Zeitung, die Rheinische Post und das Solinger Tageblatt beschäftigen sich in ihren Ausgaben vom 13., 17. und 20. 10. eingehend mit der 8. Jahresversammlung der „Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten“ sowie den allgemeinen Zielen der Esperanto-Bewegung.

Tamen, organo de la Pola Esperanto-Junularo, publikigas (en n-ro 7/8) serion de prjunulaj kanzonoj.

THE WORKER ESPERANTIST, eldonita de la brita laboristaro, klarigas (en n-ro 164) sub la rubriko „Lingva angulo“ la participajn formojn.

El la hotela ĉambro mi povis rigardi la „turon por la ŝtelistoj“. Ĝi apartenis al epoko, kiam la insula urbo Lindau povis fieri pri sia nedependeco. Nur la germana imperiestro rajtis doni direktajn direktivojn.

Hodiaŭ turistoj el multaj landoj karakterizas la bildon de tiu romantika urbo. Ankaŭ esperantistoj apartenas al tiuj. Bone konata estas ankaŭ la IFEF-kongreso en 1952. Dekdu jarojn poste, la 3/4... an de oktobro 1964 kolektiĝis tie precize 100 gesamideanoj. Trilandna kongresa komitato el Svislando, Aŭstrio kaj Germanio organizis modele la kunvenon.

La aranĝantoj estis elektintaj provokante temon „Kiel varbi per senlimaj rimejoj?“. Evidentiĝis ke 100 personoj tute ne havas la saman ideon. Nur hezite kaj ŝajne iom timeme la diskuto fantazie vagis en la regionoj de senlimaj financoj. Kelkaj eminentuloj estis demanditaj doni skribe sian opinion pri tiu ekstrema demando. Ĝenerale oni akcentis, ke per mono oni povas multe pligrandigi la reputacion de Esperanto kaj la kvaliton de la organiza kaj spirita elito. Sed la nunan naciisman tendencojn kaj la gigantan malalfabetecon, kiuj i. a. kontrastaras la enkondukton de internacia lingvo, ankaŭ multe da mono ne povas forigi, almenaŭ ne nuntempe.

Pri unu afero la kunvenintoj samopiniis: la distra vespero estis plena sukceso. S-ro Walder (Svislando), la inicianto kaj ĉeforganizanto, kore salutis ĉiujn en la gastejo „Schlechterbräu“. Oficiala reprezentanto de la urbo demonstris sian interecon kaj bonvenigis la amikojn de la Internacia Lingvo. La perfekta sorĉisto Hermann (Svislando) demonstris al la miranta publiko nekredablajn kapablecojn, kompreneble en flua Esperanto. Du ekshungarinoj prezentis dancojn folklorajn el sia gepatra lando. Kuraĝuloj el la publiko respondis kviz-demandojn. Sprita poemo estis deklamata, kaj oni ne forgesis kanti. Mallonge — agrabla sabatvespero.

La kunveno finiĝis per motorboata ekskurso sur la „Lago de Konstanz“. Kiam oni alproksimiĝis al la aŭstra urbo Bregenz, lastjare loko de simila renkontiĝo, la gracila silueto de Lindau apenaŭ estis rekoncible pro la ioma nebulo aŭtuna. Kie la Rejno, jam sufiĉe larĝa, atingas la lagon, la boato returnis kaj albridiĝis post nelonge en la haveno de Lindau. La konata lumturo kaj la ŝtona leono, blazona besto de Bavario, emneze de multaj flagoj, inter ili ankaŭ la Esperantoflago, salutis kaj adiaŭis la grupon. Dankon, karaĵ aranĝintoj! Ni revenos venontjare al Romanshorn.

W. B.

La dana poeto H. C. Andersen bone scias satiri pri la homa snobeco kaj blinda fido al aŭtoritatuloj. Li lasas gajni ŝajne stultajn kaj naivajn fuŝulojn kaj pritaktas nian emon troigi kaj klaĉi. En sama formato kaj ekipoj kiel „La Marvirineto“ (1962) aperis tri novaj fabeloj.

„La novaj vestoj de la imperiestro“ kaj du aliaj fabeloj de C. H. Andersen en la traduko de Ib Schleichner. Formato 27 × 21 cm, 52 paĝoj kun 24 tutpaĝaj kolorilustrajoj, prezo 12,— gm (DM). Adreso: Eldonejo KOKO, Kolby Kaas, Danlando.

Aperis en Nederlando „La Dua A. P.-Librolisto“ kun pli ol 200 titoloj de la Esperanto-Literaturo. La broŝuro estas senkoste havebla per: A. P. — Boekenbedrijf, Hekelveld 15, Amsterdam, Nederlando.

Novaj libroj

Aŭtoroj el dekdu landoj prikskribis siajn personajn travivaĵojn pere de Esperanto. La eventoj parte estas bagatelaj, sed ofte ili ege influis iun vivoparton. Tiu libro, facile legebla, kondukas al la speciala sfero, kiun konas nur aktivaj esperantistoj. Evidentiĝas la avantaĝoj de la Internacia Lingvo.

„Sub la signo de la verda stelo“, 72-paĝa broŝuro, 15 × 21,5 cm, prezo 4,— gm(DM), Eldonanto: Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

Hungara Esperanto Asocio alvokas mendi la post nelonge aperintan duan eldonon de „La Tragedio de l' Homo“ de Emeriko Madách tradukitan de d-ro Kálmán Kalocsay.

„La Tragedio de l' Homo“, prezo 8,80 gm(DM). Mendojn sen tuja pago akceptas: „Kultura“ Kövy — és Hirlap Külkereskedelmi Válatat, Fő-utca 32, Budapeŝt I, Hungario.

Vojaĝraporto en gajaj versoj. La sensacio de tiu libro estas, ke tiu gaja raporto ekzistas el laŭlecionacia esperantokurso. Jen „instruilo“, kiu vere ne naŭzas, rekomendinda kiel donaco al si mem kaj al gekonatuloj.

„Zauberwort-Weltrekord“ de Lorenz Urbano, Luzern, 4,90 gm (DM), havebla per „Esperanto-librejo, Otto Walder, Romanshorn, Svislando, ĉekkonto Karlsruhe 701 09.

17a IFEF — Kongreso

22. — 28. 5. 1965

en Hamar (Norvegio)

En la venonta eldono de la BULTENO ni

publikigos detalojn pri la Kongreso

Komuna varvagona stoko

La konata Eŭrop-varvagona stoko havas nun konkuranton. En decembro 1963 subskribis kontrakton pri la komuna eluzo de la varvagona stoko la fervojoj de Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Rumanio, Sovetunio kaj Orienta Germanio. Tiu kontrakto realiĝis ekde julio 1964. La vagonoj ricevis la mallongigon „OPW“. La kontribuoj de la koncernaj fervojoj varias inter 4000 kaj 36000 varvagonoj. Oni kalkulas pri kapacito de 100 milionoj.

Ekde la somerferioj 1965 nova naturamika domo malfermos siajn pordojn ankaŭ por esperantistoj. Adreso: Maison des „Amis de la Nature — section Bruxelles —“, 37, Rue d'Argonne, Bruxelles 65, Belgio.

Serĉas korespondantojn pri interŝanĝo de poŝtmarkoj: s-ro Barnier, 82, Avenue de la Gilquinière, Sainte Genevieve des Bois (S et O), Francio.

Korespondadon deziras:

s-ro K. Ŝustiĉ „Viadukt“
Drvenik, Kod. Makarsko,
Jugoslavio

La „Esperanto-Sekcio por amikeco kaj kulturaj interrilatoj kun eksterlando, Gorkija iela 11a, Riga/Latvio, Sovetunio“ atentigas pri la „Muzeo pri historio de medicino de P. Stradius. Ekzistas esperantlingva broŝuro kun anglalingva bildprospekto.

Am 7. Dezember 1964 findet um 16.30 Uhr im Dorpmüller-Saal der Bundesbahndirektion Frankfurt ein Dia-Vortrag unseres Sprachfreundes und Briefmarkensammlers Mager über das Thema „Esperanto auf Briefmarken“ statt. Gäste willkommen!

De la 27a de decembro 1964 ĝis la 3a de januaro 1965 okazos en la junulargastejo de la Imperiestra Kastelo Nürnberg la 8a seminario de la Germana Esperanto-Junularo. Ĝenerala temo: „Ideologio kaj stato — reciproka influo, realaĵoj kaj mitoj“. Inter la elstaraj oratoroj troviĝos UEA-prezidanto prof. d-ro Lapenna. Prezo: 65,— gm (DM) por gejunuloj malpli ol 25 jaraj; 75,— gm (DM) por pliaĵuloj, krome subvencio por gejunuloj. Antaŭpago de 10,— gm (DM) al poŝtĉekonto Karlsruhe n-ro 545 77 por „Deutsche Esperanto-Jugend“. Adreso por aliĝo: Germana Esperanto-Junularo, Postfach 2113, 85 Nürnberg 2.

Inter la 7a kaj 14a de februaro 1965 denove okazos Esperantoskisemajno per fervojistoj en Aŭstrio. La montodomo situas en altitudo de 1620 m apud Grossarl (St. Johann in Pölten). disponeblaj estas unu-kaj dutilitaj ĉambroj kun fluanta akvo kaj centra hejtilo, krome amasloĝejo. Prezo por kompleta aranĝo: ĉirkaŭ 100 gm (DM). Ĉiuj gekolegoj, ĉefe la junaj, estas kore invitatataj partopreni tiun belan semajnon. Informoj kaj aliĝoj per: Günther Doliwa, 3031 Cordingen, n-ro 16; deĵoradreso: Bahnhof Cordingen über Hannover.

Anoncoj

Panorama

Den Haag. Während des 49. Kongresses des Universalen Esperanto-Bundes (UEA) wurde der isländische Dichter Baldur Ragnarsson vom dänischen Esperanto-Verlag KOKO zum Autor des Jahres 1964 erklärt. Sein bekanntestes Werk ist der Roman „Stufen ohne Namen“.

Hamburg. Anlässlich des 4. Internationalen Treffens der Eisenbahner-Funkamateure in Hamburg am 19./20. September sprach Herr Giessner als Beauftragter des Hauptvorstandes des BSW für Esperanto. Die Eisenbahner-Funkamateure nahmen die Empfehlung auf, sich zur Überbrückung der Verständigungsschwierigkeiten mit den Landesverbänden der Eisenbahner-Esperantisten in Verbindung zu setzen.


Helsinki. Die bisherigen Bemühungen der skandinavischen Landesverbände, Esperanto innerhalb des Internatio-

naln Eisenbahn-Alkoholgegner-Verbandes (IEAV) zum Zuge zu verhelfen, sind bisher am Widerstand der deutsch und niederländisch sprechenden Mitglieder gescheitert. Die Bemühungen werden jedoch fortgesetzt. Der Vorsitz des finnischen Landesverbandes plant im Anschluß an den nächsten IFEF-Kongreß in Norwegen eine Fahrt nach Finnland. Interessenten wenden sich an: Herrn Matti Voltti, Tempelkatu 25 B 47, Helsinki, Finnland.

Kronach. Auf Vorschlag von Eisenbahner-Esperantisten, die der Gruppe „Luma Stonego“ in Lichtenfels angehören, erklärte sich das Städtische Verkehrsamt Kronach vor einigen Monaten bereit, den Stadtprospekt mit einer Esperanto-Übersetzung zu versehen. Für diesen Projekt gingen Anforderungen aus aller Welt ein. Nachforderungen erbeten über: Städtisches Verkehrsamt, 864 Kronach.

Mainz. Im September fand in Mainz die 4. Europäische Postwertzeichen-Ausstellung der Eisenbahner statt, an der sich auch die Mitglieder Mager (Frankfurt) und Heimlich (Soltau) unserer Vereinigung beteiligten. Die hierbei gezeigten Sammlungen mit Esperanto-Briefmarken fanden starke Beachtung. Für die Motivsammlung von Herrn Mager wurde die bronzene Plakette vergeben.

Peking. Die chinesische Esperanto-Liga gibt seit 1950 ein zweimonatig erscheinendes Organ „EL POPOLA ĈINIO“ heraus. Interessenten und neu hinzukommende Leser erhalten als Zugaben Kalender und Briefpapier sowie kostenlose Teilabonnements



*Al niaj membroj
kaj
eksterlandaj geamikoj
ni deziras
ĝojigan Kristnaskon
kaj
sukcesplenan Novan Jaron!*

*Germana Esperanta
Fervojista Asocio
Estraro*

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck / presio: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.